iam parto de la fortikaĵoj. Sur la pordo, subskribo per nigraj literoj : « trovhundejo ». La hundoj, enirante, devis, kiel oni diras, « senti la morton » ĉar la hundejo kuntuŝis senfeligejon.

Ni sonoris. Oficisto kun galona kasketo malfermis. Li rekonis min kaj subite afabliĝis. — « Blindula hundo, tondita leone, kun tufo ĉe la vosto ? Ne, mi ne memoras pri tia hundo... Sed oni povas ĉiam vidi, vi komprenas : tiel multaj alvenas ! La ordonoj estas tre severaj de kelka tempo pro la rabio. »

Ridante, li gvidis nin al angulo de la korto, kie en kadra hundejo, kelkaj malfeliĉaj hundetoj ankoraŭ ne postulitaj, atendis sian sorton.

Neniu bojis ĉe nia proksimiĝo. Malribelante, melankolie, ili rigardis nin per dolĉaj okuloj. La blindulo alvokis Buriketon, sed Buriketo ne respondis.

— « *Jen, diris la oficisto, ĉiuj hundoj kaptitaj hieraŭ.* »

— « *Kaj, la aliaj, tiuj de antaŭhieraŭ ?* »

— « *Ho ! tiuj ĉi ! Ilia kalkulo estas fermita ! De tiu mateno ili jam ne bezonas nutraĵon.* »

Tiam ne povante kaŝi siajn antaŭsentojn malĝojajn, la blindulo, kun voĉo igata ankoraŭ pli petega de la kortuŝeco, demandis : « ĉu oni permesus al mi ilin vidi ? Por esti tute certa... ĉu okaze... ».

— « *Nenio pli facila ; ili estas tie ; pro najbara knabo kiu malfruiĝis kaj ankoraŭ ne kunprenis la liveraĵon.* »

Ĉirkaŭ ronda kaj volba ĉambrejo, duona dekduo da hundoj pendis de hokoj fiksitaj en la muro ; la kolo estis premata de laĉo, la korpo streĉita, la lango eltirita ; ili prezentis la sintenadojn malĝoje komediajn, kiujn pendilo donas, ŝajne, al bestoj, kiel al homoj.

Sunradio penetris tra celtruo, blindiga kaj maldika, kiel fajre ruĝigita ferstango ; kaj tiu radio, ŝprucigante per oro la ruĝan kaj malpuran pavimentaron, pliigis la funebran mallogecon de tia vidiĝo.

Naŭzigite, mi provis forigi la blindulon : « Eliru ! Via Buriketo ne estas tie ĉi. »

Sed la blindulo rifuzis, malkonfidante ; li havis sian ideon kaj volis sciiĝi per si mem. Malrapide, per siaj tremantaj manoj, li palpis, unu post alia, la mortintojn, kaj li haltetis iafoje, timante rekoni Buriketon. Je la tria — pudelo kun griza ŝaflano — li kortuŝiĝis kaj rekomencis, tre ekscitite, sian mutan serĉadon. Nova esploro pli atenta trankviligis lin. Li diris al ni : « Mi tre timis : tiu ĉi similas al ĝi sed ne estas ĝi ».

Fine, kiam li estis ĉe la lasta, kun feliĉa ekĝemo : « Vi estas bonaj homoj, mi dankas vin. Vidu ! Pensi, ke Buriketo povis tiamaniere morti ! Mi ne estus dorminta la tutan nokton. Sed nun, se venus frizpudelo, kaj se ĝi estas Buriketo, oni ne mortigos ĝin, ĉar antaŭe mi repostulis ĝin. »

La oficisto promesis kaj aldonis : « Tio ĉi estas via rajto, se vi volas veni tien ĉi ĉiumatene. Kaj nu ! Mi konsilas al vi, atendu. La suno malleviĝas kaj la transportilo ne malfruos alveni kun la ĉasaĵo de la tago. »

Li estis prava : la veturilo alvenis, antaŭirata de bruo de dika sonorilo, kiu post la kradoj, ĉe sojlo de la pordoj, pretervekis koncerton de furiozaj bojoj. Du homoj, armitaj per laĉo, kaj ŝnuroj, akompanis ĝin.

Tuj antaŭ la hundejo oni mallevis la balancoklapon, kiu similigis la veturilon al grandega muskaptejo. Sed la kaptitoj, divenante, ne volis eliri.

— « *Buriketo ! ĉu ci estas tie ?* » *diris dolĉe la blindulo.*

*Hundo elsaltis, bojanta, freneza je ĝojo.*

« *Ha ! Buriketo ! Ha ! La malspritulo, kiu lasis sin kapti !* »

Buriketo proponis jam sian kolon al la kolĉeno, lekante la manojn, kiuj alligis ĝin. Kaj dum mi senbrue pagis la elspezojn de la administracio, mi aŭdis la blindulon kriantan : « Iru, Buriketo, iru antaŭen, ĉiam rekte, kamparen ! Iru Buriketo ! For de tiuj urboj kie homoj pendigas hundojn ! ».

PAUL ARENE (trad. P. Sarpy).